



# La blindulo Baba Abdala

**b**

Por ĉi tiu fabelo estas uzata la tiparo *Goudy Modern 94*,  
desegnita de Franko Luin. La kajero estas unu en serio  
de fabelkajeroj prezentantaj la tiparojn de la sama  
desegnisto. Ili estas elŝuteblaj ĉe  
*[www.omnibus.se/fabelaro](http://www.omnibus.se/fabelaro)*.

---

© 2002 Omnibus Typografi

---

OMNIBUS TYPOGRAFI

BOX I35 · SE-I35 23 TYRESÖ · TEL. +46 8 742 83 36

[franko@omnibus.se](mailto:franko@omnibus.se) · [www.omnibus.se](http://www.omnibus.se)

---

**M**i naskiĝis en Bagdado, kaj belan riĉaĵon testamente difinis al mi miaj gepatroj, kiuj mortis, unu post la alia, en la daŭro de kelkaj tagoj. Mi aĉetis okdek kamelojn, kiujn mi luigis al negocistoj por tiuj longaj komercaj vojaĝoj, kiujn faras anaroj da homoj, nomataj "karavanoj"; kaj ili bone pagis al mi ĉiun vojaĝon, kiun mi kun ili faris.

Iun tagon, revenante el Balsora kun miaj senŝarĝigitaj kameloj, mi renkontis derviŝon, kiu marŝis al tiu urbo.

Post kiam ni preparolis pri multe da bagatelaĵoj, li min informis, ke li konas trezorejon iom apude, kie kuŝas tiaj grandegaj riĉaĵoj, ke — se ĉiuj miaj kvar dudekoj da kameloj estus ŝarĝitaj de oro kaj juveloj el ĝi prenitaj — ŝajnus kvazaŭ oni nenion efektive forprenus.

Tiu bona novaĵo samtempe min mirigis kaj ĉarmegis; kaj mi estis tiel plenega de ĝojo, ke mi apenaŭ povis min teni. Mi ne povis kredi, ke la derviŝo kapablas diri al mi mensogon, tial mi falis sur lian kolon, dirante: "Sanktulo, mi scias, ke vi taksas la riĉecon de ĉi tiu mondo kiel neniaĵon; tial, kia bono al vi povas esti la kono de tia trezoro? Vi estas sola, kaj multon da ĝi vi

ne povas kun vi forporti; montru do al mi la lokon de la trezoro, kaj mi ŝarĝos ĉiujn miajn kamelojn, kaj kiel dankofero pro via komplezo, mi donacos al vi unu el ili.”

La derviŝo, kvankam li vidis mian avarecon, tamen ne koleris pri mia malmodera propono, sed respondis, sen plej malmulte da embaraso: ”Mi havas alian proponon pli justan kaj egalan por fari al vi; restos tute ĉe vi, ĉu vi ĝin akceptos, aŭ ne. Vi diras, ke vi havas kvar dudekojn da kameloj; mi estas preta por vin konduki al la loko, kie kuŝas la trezoro, kaj ni ilin ŝarĝos per tiom da juveloj kaj oro, kiom ili povas bone porti, sub la kondiĉo, ke, tuj kiam ili estos tiel ŝarĝitaj, vi lasos al mi preni unu duonon kaj vi prenos la alian; post tio ni disiĝos kaj kondukos niajn kamelojn kien ajn ni deziros.”

Ne estis tempo por heziti; mi devas aŭ akcepti la proponon, aŭ poste penti mian tutan vivdaŭron, ke mi preterlasis la okazon amasigi grandan riĉaĵon; tial mi akceptis kaj tuj kolektis ĉiujn miajn kamelojn.

Vojaĝinte kelke da tempo, ni eniris vastan valon, kies enirejo estas tiel mallarĝa, ke du kameloj ne povis iri flanko ĉe flanko. La montaroj, kiuj enfermis tiun valon, havis rondan konturon, sed estis tiel altaj, krutegaj kaj neatingeblaj, ke oni ne devis timi, ke oni lin vidos.

Kiam ni alvenis interne de la montara rondo, la derviŝo diris al mi: ”Haltigu viajn kamelojn kaj kuŝigu ilin, por ke ni pli facile ilin ŝarĝu, kaj mi iros trovi la lokon de la trezoro.”

Per helpo de fajrilo la derviŝo bruligis fajron, kaj tuj en ĝin ĵetis incenson, samtempe elparolante kelkajn vortojn; ĉe tio la roko, kvankam je grandega, vertikala alto, malfermiĝis simile al duopaj pordoj, kaj malkaŝis belegan palacon en la kavo de la montoj.

Mi ne restis eĉ momenton por admiri la grandegan riĉaĵaron, kiun ĉe ĉiuj flankoj mi vidis, sed kuregis al la plej proksima amaso da ormoneroj, kaj komencis plenigi la sakon, kiun mi tenis en la mano, per tiom da oro, kiom mi kredis, ke mi povas porti. Same faris la derviŝo; sed mi rimarkis, ke li pli atentis la juvelojn, kaj, post kiam li klarigis al mi sian motivon, mi sekvis lian ekzemplon; tial ni forportis multe pli multe da juveloj ol da oro. Pleniginte niajn sakojn kaj ŝarĝinte niajn kamelojn, ni havis nenion plu por fari ol refermi la trezorejon kaj foriri.

Antaŭ ol ni disiĝis, la derviŝo revenis en la trezorejon, kie kuŝis multe da prilaboritaj oraj vazoj je diversaj formoj kaj grandoj. Mi rimarkis, ke li prenis el unu el tiuj vazoj malgrandan skatolon faritan el iu al mi nekonata ligno, kaj ĝin metis en sian brustaĵon; sed unue li lasis min vidi, ke ĝi enhavas nur specon de pomado.

La derviŝo uzis la saman formulon por fermi la trezorejon, kiel li faris por ĝin malfermi. Tiam ni dividis niajn kamelojn. Mi metis min antaŭ la kameloj, kiujn mi rezervis por mi mem, kaj la derviŝo sin metis antaŭ la ceteraj, kiujn mi al li donis.

Per la sama vojo, per kiu ni eniris, ni eliris el la valo, kaj kune vojaĝis ĝis ni atingis la landvojon, kie ni devis

disiĝi. Ni ĉirkaŭbrakis nin reciproke kun granda ĝojo, kaj, dirinte unu al la alia "Iru kun Dio," ni disiris.

Apenaŭ mi faris kelkajn paŝojn, la demono de maldankemo kaj envio kaptis mian koron, kaj mi domaĝis la perdon de miaj kameloj, sed multe pli multe la riĉaĵojn, per kiuj ili estis ŝarĝitaj. "La derviŝo," mi diris al mi, "ja ne bezonas ĉiujn ĉi riĉaĵojn; li estas estro de la trezorejo, kaj povas el ĝi elpreni kiom li volas." Mi forlasis min al la plej malnobla maldankemo, kaj tuj decidis forpreni de li la kamelojn kune kun iliaj ŝarĝoj.

Ĝisirinte lin, mi diris: "Mia bona amiko, apenaŭ mi disiĝis de vi, venis en mian cerbon penso, kiun nek vi nek mi pripensis. Vi estas sankta derviŝo, kutiminta vivi trankvilece, liberigita for de ĉiuj mondaj zorgoj, kaj celanta nur la servadon al Dio. Eble vi ne scias la penadon en kiun vi vin implikas, prenante sur vin la kondukadon de tiom da kameloj. Se vi sekvus mian konsilon, vi retenus ne pli ol tridek; vi trovos, ke la kondukado de tia nombro sufiĉe vin ĝenos. KREDU al mi, ĉar pri tia afero mi estas sufiĉe sperta."

"Mi kredas, ke vi estas prava," respondis la derviŝo, trovinte, ke li ne povas min kontraŭstari. "Mi konfesas, ke mi ne pensis pri tio. Elektu la dekon, kiu plej al vi plaĉas, forprenu ilin kaj vojiru je la nomo de Dio."

Mi apartigis dekon, kaj, forpelinte tiujn, mi ilin kondukis sur la vojon, por ke ili sekvu miajn aliajn. Mi ne povis imagi, kial la derviŝo tiel facile konsentas fordoni siajn kamelojn, kaj tio pligrandigis mian avarecon, kaj mi min flatis, ke ne estos malfacile akiri plian dekon. Mia interparolado kun la derviŝo efikis,



kion mi deziris, ĉar, sen ia hezitado, li donis al mi plian dekon da kameloj .

Ĉiu supozus, ke nun mi estos kontenta, sed same kiel ĉe persono kaptita de la hidropso, ju pli li trinkas, des pli li soifas, tiel mi fariĝis pli avara kaj pli deziregis posedi la ceterajn dudek kamelojn.

Mi duobligis miajn petegojn, preĝojn kaj trudpetojn por inklinigi la derviŝon, ke li donu al mi dek el la ceteraj kameloj, kion li faris bonvole; kaj, rilate al la cetera deko, kiun li ankoraŭ posedis, mi tiamaniere lin ĉirkaŭbrakis, kisis kaj karesis — petante, ke li ne rifuzu, sed tutigu la komplezon, kiun mi ĉiam poste ŝuldos al li — ke li kronis mian ĝojon, donante al mi ankaŭ la lastan dekon.

"Faru el ili bonan uzon, mia amiko," diris la derviŝo, "kaj memoru, ke Dio povas forpreni kiel ankaŭ doni la riĉaĵojn, se ni ne helpas al la malriĉuloj, kiujn Li enfaligis en la staton de mizeruloj kaj almozoŭloj, kun intenco, ke la riĉuloj povu meriti per sia bonfarado pli grandan rekompencan en la alia mondo."

Tamen mi ne estis kontenta, kvankam mi rehavis miajn kvardek kamelojn kaj sciis, ke ili estas ŝargitaj de netaksebla trezoro, ĉar penso venis en mian cerbon, ke la malgranda skatolo da pomado enhavis ion pli multekostan ol ĉiuj riĉaĵoj, por kiuj mi devis lin danki. Tio min decidigis fari ion por ĝin akiri.

Mi ĵus ĉirkaŭprenis kaj adiaŭis lin, kiam, deturnonte min de li, mi diris: "Kion vi volas fari el tiu malgranda skatolo da pomado? Ĝi ŝajnas tia bagatelo, ke ne valoras la penon ĝin forporti."

La derviŝo, sen plej malgranda ŝanceliĝo, ĝin eltiris el sia brustaĵo kaj ĝin donis al mi kun la plej granda ĝentileco.

Tenante la skatolon en la mano, mi ĝin malfermis, kaj, rigardinte la pomadon, diris al li: "Ĉar vi estas tiel bona, mi estas certa, ke vi ne rifuzos al mi diri la apartan utilon de ĉi tiu ŝmiraĵo."

"Ĝia uzo estas tre surpriza kaj miriga," respondis la derviŝo. "Se vi metos iom da ĉi tiu ŝmiraĵo ĉirkaŭ la maldekstra okulo kaj sur la palpebron, vi vidos ĉiujn trezorojn entenatajn en la internaĵo de la tero; sed se vi ĝin metus al la dekstra okulo, ĝi vin nepre blindigus."

Mi decidis fari mem la eksperimenton. "Prenu la skatolon," mi diris al la derviŝo, "kaj almetu iom da ŝmiraĵo al mia maldekstra okulo; ĉar vi scias pli bone ol mi, kiel tion fari; mi deziregas provi tion, kio ŝajnas al mi tiel nekredebla." Sekve mi fermis la maldekstran okulon, kaj la derviŝo faris al si penon almeti la ŝmiraĵon.

Post kiam li tion faris, mi malfermis mian okulon, kaj estis konvinkita, ke li diris al mi la veron. Mi vidis grandegajn trezorojn, kaj tiajn nekalkuleblajn diversajn riĉaĵojn, ke estas al mi neeble ilin priskribi. Sed mi devis fermigi la dekstran okulon per la mano, kio laciĝis min; tial mi petis, ke la derviŝo almetu iom da pomado al tiu okulo.

"Mi estas preta fari tion," respondis la derviŝo, "sed vi devas rememori, kion mi jam diris al vi, ke, se vi me-



tus iom da ĝi sur vian dekstran okulon, vi tuj blindiĝus. Tia estas la enestanta potenco de la ŝmiraĵo.”

Mi ne kredis al la derviŝo, kvankam li parolis kiel honestulo. Mi konvinkiĝis, ke — se la pomado, almetite al la maldekstra okulo, havos la potencon montri al mi ĉiujn trezorojn de la tero, tiuokaze, almetite al la dekstra — eble ĝi havos potencon por fari ilin al mi disponeblaj laŭ mia volo. Ekkaptite de tiu penso, mi instigis al la derviŝo, ke li almetu la ŝmiraĵon al mia dekstra okulo, sed li persistege min rifuzis.

La derviŝo min kontraŭstaris kiel eble plej longe; sed, vidinte, ke mi povas, pere de mia pliforto, devigi lin fleksiĝi al mia volo, li diris: "Ĉar vi absolute tiel volas, mi devas vin kontentigi.”

Sekve de tio, li prenis malmulton el la malbenita pomado, kaj ĝin almetis al mia dekstra okulo, kiun mi tenis fermita. Sed, ho, ve! tuj kiam mi ĝin malfermis, mi povis nenion vidi, nek per tiu, nek per la alia okulo. Antaŭ mi estis densa mallumo; kaj mi blindiĝis, kiel vi nun min vidas.

"Ha! derviŝo," mi ekkriis; "tio, kion vi al mi antaŭdiris, estas ja tro vera. Nun mi sentas, kian malfeliĉon mi okazigis al mi. Sed vi, kara amiko," mi ekkriis, ankoraŭ al la derviŝo, "kiu estas tiel bonfarema kaj malavara, inter la multaj mirindaj sekretoj, kiujn vi konas, ĉu vi ne havas unu, kiu redonos al mi la vidkapablon?"

"Malfeliĉa mizerulo," respondis la derviŝo, "se vi jam antaŭe sekvus mian konsilon, vi evitus ĉi tiun malfeliĉegon; sed vi havas bone merititan punon; la blindeco de

via spirito blindigis viajn okulojn. Estas vere — kiel vi devas scii malgraŭ nia mallonga konateco — ke mi multajn sekretojn posedas, sed mi nenian havas, kiu povus redoni al vi la vidon. Preĝu al Dio, se vi kredas, ke tia estaĵo ekzistas; estas Li sola, kiu povas ĝin redoni al vi. Li donis al vi riĉaĵojn, je kiuj vi estis malinda, kaj nun Li ilin forprenas de vi, kaj, per miaj manoj, Li donos ilin al homoj ne tiel nedankemaj kiel vi.”

La derviŝo ne diris plu, kaj mi povis nenion respondi. Kolektinte miajn kamelojn, li forkondukis ilin kaj laŭiris la vojon al Balsora. Mi petis, ke li min ne lasu en tiu mizera stato, sed almenaŭ konduku miu al la plej proksima karavano; sed li estis surda por miaj preĝoj kaj petegoj. Tiel, senigite je ĉio, kion mi posedis en la mondo, mi estus mortinta pro bedaŭrego kaj malsato, krom tio, ke la morgaŭan tagon, karavano, revenante de Balsora, akceptis min bonfare, kaj rekondukis min al Bagdado.

Mi ne havis vivrimedojn, se ne almozon peti, kion mi ĝis nun faris. Sed, por elpagi mian krimon kontraŭ Dio, mi faris ĵuron, en la celo de pentosufero, postuli vangofrapon de ĉiu bonfaremulo, kiu kompatos mian mizeran staton.



Fabelo el la kolekto "1001  
noktoj". Tradukis George Cox.

